# Komunikoj

JARO 37-a | OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO | N-ro 148 2012


"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**




## ELDONEJO LORENZ – RETROSPEKTIVO 2012

Kiam ni rigardas malantaŭen la finiĝantan jaron, Eldonejo Lorenz certe kunportis alian ŝtoneton por la Granda Konstruaĵo de la Bono, kaj ni donis alian paŝeton antaŭen por la diskonigo de noblaj aferoj, precipe kiam ni pritraktas Evangelion, Spiritismon kaj Esperanton.

Sen ia dubo, la vojo ne estis facila, ĉar ni perfekte scias pri ŝtonetoj kaj ŝtonegoj sur niaj vojoj; tamen, kiu kredas je la Sinjoro, timas nenion kaj marŝas ĉiam antaŭen kaj supren!

Do, karaj gesamideanoj, ĉe la fino de 2012, ni volas tutkore danki al ĉiuj Kunlaborantoj, Amikoj kaj Fratoj de nia Eldonejo. Ke en 2013, ree ni kune laboru, mano en mano, ĉar la rikolto de belaj kaj bonodoraj floroj estas certaj!

Ĉi-jare, krom la tradicia Almanako Lorenz kaj aliaj libroj en la portugala lingvo, ni reliefigas la jenajn lanĉojn: "Kiu Timas la Morton?" kaj la Agendon Lorenz 2013, precipe ĉi-lasta, per kiu ni omaĝas la amantojn de E-historio, pere de historiaj bildkartoj.

Feliĉan Kristnaskon kaj fruktodonan novan jaron!

La Estraro

## BELA FESTO!!!



La 7-an de Decembro/2012 Eldonejo Lorenz festis sian 38an jaraĝon ĉe Spiritisma Grupo Regenerigo, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Kia bela festo! Kia agrabla etoso!

Krom bela prelego, Richard Simonetti, tre fama brazila spiritista verkisto, respondis diversajn demandojn, precipe pri la enhavo de la lanĉita libro, "Kiu Timas la Morton?", de lia plumo. Tuj post la fino de la programo, li aŭtografis sian verkon.


Ismael Miranda e Silva, Konsilanto de Eldonejo Lorenz, brile gvidis la programon, en kiu pli ol 200 homoj partoprenis kaj aplaŭdegis la Artan Momenton, kiam Neide Barros Rêgo kantis kaj deklamis, kaj la Koruso Sindona Amikaro ankaŭ ĝojigis ĉiujn ĉeestantojn!


Ismael ankaŭ reliiefigis pri la graveco de la ĵus lanĉitaj libroj "Kiu Timas la morton?" kaj "Almanako Lorenz 2013" por la spiritista propagando, precipe ekster Brazilo, kaj ĉe la fino de la programo, la Estraro de Eldonjo Lorenz omaĝis la eks-prezidanton de nia Eldonejo, Edgard Monteiro Machado, elkarniĝinta la 5-an de Oktobro/2012, pro la fekunda kaj imitinda laborado de tiu Bonkora Giganto por Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto.

Elkoran dankon al ĉiuj kaj ĝis la 39-a datreveno!

# Ankoraŭ pri la 38-a datreveno de nia Eldonejo


























LORENZ



Fotoj de Luismar Lima



# CESARE LOMBROSO

**SCIENCA AGADO**

Kuracisto diplomita de la Reĝa Universitado de Pavio. Estante 17-jaraĝa li verkis siajn unuajn librojn. Profesoro ĉe la Universitado de Pavio kaj poste ĉe la Universitato de Torino. Li eltrovis la devenon de pelagro kaj proponis metodon kaj antidoton por ekstermi tiun malsanon, kiu mortigis milojn da italoj ĉiujare.

Li kreis la modernan Kriminalan Antropologion. Kiel speciala invitito li partoprenis plurajn kongresojn de Psikologio kaj Medicino.

Li ricevis diversajn ordenojn kaj omaĝojn, i.a. kiel Komandoron de la Honora Legio. Li verkis pli ol dekon da libroj pri Psikiatrio, Puna Leĝaro, Medicino kaj Psikologio.

**SPIRITISMA AGADO**

En 1882, en Torino, li publikigis libreton ridindiganta Spiritismon. En 1888, sur la gazeto “Fanfulla della Domenica”, li konsentas pri la ebleco, ke li eraras en la konkludoj koncernantaj Spiritismon.

En 1891, laŭ invito de Grafo Chiaia, itala eminentulo, li komencis siajn esplorojn pri la spiritismaj fenomenoj pere de la mediumino Eusapia Paladino, kaj atestas pri ilia vereco.



Ĉe Grafino Celesia, en 1902, emociita li vidis la materiiĝintan spiriton de sia patrino kaj kun ŝi interparolis pri intimaj aferoj koncernantaj al ilia kunvivado. Tiu fakto ripetiĝis plurfoje.

Li verkis unu el la plej belaj libroj de la klasika Spiritismo: Hipnotismo kaj Mediumeco, tradukita portugalen kaj eldonita de Brazila Spiritisma Federacio. Fenomenoj esploritaj de Cesare Lombroso: tiptologio, transmateriiĝo, levitacio, lumaj aperaĵoj kaj luma materiiĝo.

**SPIRITISMA KONFESIO**

El la gazeto The New York Herald pri la sciencisto Lombroso: “Li asertas, li kredas, kaj krome li estas certa kaj mem konvinkiĝinta pri la ekzisto de transtombaj inteligentaj fortoj, kiuj komunikiĝas per ja evidentaj rimedoj”.

En letero al la klera majstro Ernesto Giolfi, la fama profesoro skribis: “Mi hontas kaj bedaŭras, ĉar mi tiel insiste atakis la realon de la faktoj t.n. spiritismaj; kaj mi diras “la faktoj”, ĉar mi daŭre estas kontraŭ la teorio. Tamen, ekzistas la faktoj, kaj mi ĝojas esti ilia sklavo”.

# IMITINDA EKZEMPLO!

kun granda ĝojo la Estraro de la Grupo de Esperanto Pac-horo, en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, sciigas al ĉiuj geesperantistoj la rezulton de la interna konkurso inter la gelernantoj de la grupo por partopreni la Brazilan Kongreson de Esperanto, en Januaro 2013, en la bela kaj ĉarma urbo Barra do Garças. “Komunikoj” pliatentigas, ke ĉiuj elspezoj de la gelernantoj estas subvenciotaj de la Grupo Pac-horo.

Jen tre grava stimula iniciato por la novaj gelernantoj de Esperanto en la tuta mondo kaj, sendube, imitinda ekzemplo por la esperantistaj grupoj, ĉar, kiam ni partoprenas Kongreson de Esperanto, nacian aŭ internacian, ni gajnas novan forton por esti, fakte, nova laboranto de Esperanto.

La Estraro nin sciigas, ke ili jam planas novan stimulon por 2013: konkurso por la Universala Kongreso en 2014, en Argentino! Sen ia dubo, la Grupo meritas aplaŭdojn kaj, jen, karaj geamikoj, treege bona imitinda ekzemplo!

Se vi volos koni detalojn pri tiu grava iniciato,
skribu al cppaco@globo.com



Jen la venkintoj de la Konkurso:
1º - Leandro Silvestre de Macedo (20 jara)
2º - Sabrina Mota da Rocha (18 jara)



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al Majnov, 29.IX. 1889
(poŝtstampo)

Estimata amiko! – La verkojn pri kiuj vi petis, mi sendis al vi hodiaŭ. La sciigo pri Tolstoj faris al mi grandan plezuron; sed la demando estas ĉu liaj vortoj esprimas efektive ian certan opinion kaj intencon aŭ ĉu ili estas nur ĝentila sensignifa respondo al via letero! Se li efektive volas labori por nia afero, skribi en gazetoj etc. – tiam ĝi estas tre grave por ni.

L=Z.f.

Al s-ro W. en S.P.

En la stilo de Via artikolo mi faris kelkajn ŝanĝojn. La formoj “tiela” (anstataŭ “tia”), “naciono” (anstataŭ “nacio”) per si mem estas ne malbonaj, kaj eble kun la tempo la verkantoj ilin akceptos kaj ili elpuŝos iom post iom la formojn malnovajn; sed en ĉiuj artikoloj aŭ verkoj, kiuj eliras sub mia redakcio, mi devas peni, ke la lingvo estu uniforma; ĉar alie la legantoj povos ĝin akcepti kiel faktajn kaj devigajn novenkondukaĵojn.

L-Z-f.

Al Majnov, 1889
Estimata amiko!

Se sinjoro Schimidt promesis al vi presi la “Manfredon” en la gazeto, mi nenion havas kontraŭ tio ĉi; sed ŝajnas al mi ke li ne facile povos plenumi sian promeson, ĉar en la malgranda gazeto ne tiel baldaŭ troviĝos loko por pecoj pure literaturaj. Alia afero se ni havus gazeton ĉiusemajnan, tiam ĝi povus havi karakteron pli literaturan; sed en la malgranda gazeto ĉiumonata ni devas doni nur tion, kio havas intereson kurantan kaj ni ne povas uzi la riĉan materialon de prozaj tradukoj, kiujn oni sendas al ni de ĉiuj flankoj. Nur unu facilan kaj tre bele tradukitan rakonton el Andersen ni jam longe promesis presi, kaj eĉ tion ĉi ni povos fari nur tiam, kiam ni havos liberan lokon. Se la Manfred estos presata, tiam vi devas konsenti ke mi ŝanĝu en ĝi iom la stilon, ĉar mi prenis sur min la respondecon por la pureco de la lingvo en nia gazeto.

L-Z.f.

### *Al amikoj de Lorenz*

Estimata ano de Lorenz, ni petas komplezon: kiam vi deponos la pagon de la jarkotizo al nia Eldonejo, bonvolu nin sciigi, ĉar multaj same tion faras kaj ni ne sukcesas identigi de kiu estas la depono.


Se vi ankoraŭ ne realiĝis, jen estas tempo; se vi ankoraŭ ne aliĝis, petu vian aliĝilon kaj helpu nin por la disvastigo de Spiritismo tra la tuta mondo, kaj sciu kion vi ricevos en la komforto de via hejmo.



Michela Lipari, itala esperantistino, eksa estrarano de UEA, ricevas Almanakon Lorenz 2012, en la Hanoja UK(2012), el la manoj de la samideano Robinson Matos, Prezidanto de Eldonejo Lorenz.

Ankaŭ, kara amiko, se vi volos koni Almanakon Lorenz, skribu al ni kaj kun plezuro ni tuj ĝin sendos al vi:

**eldonejo_lorenz@uol.com.br**





**LA ĈIELO KAJ LA INFERO AŬ JUSTECO DE DIO LAŬ SPIRITISMO**

Kompara studo de la doktrinoj pri la forpaso de la animo, el la korpa vivo en la spiritan vivon, pri la estontaj punoj kaj rekompencoj, pri la ângeloj kaj demonoj, pri suferoj ktp, sekvata de nombraj ekzemploj pri efektiva situacio de la animo dum kaj post la morto.

Jen, kara leganto, se vi volos koni aliajn detalojn pri ĉi tiu libro, petu vian senpagan ekzempleron kaj kun granda ĝojo ni tuj ĝin sendos al vi.

eldonejo_lorenz@uol.com.br
**Skajpo: Lorenz editora**
**Facebook: Editora Lorenz**



## EDGARD MONTEIRO MACHADO

Jen speciala omaĝo de nia Estraro al la ege kara Frato, Amiko kaj Samideano, EDGARD MONTEIRO MACHADO, eksprezidanto de nia Eldonejo, elkarniĝinta la 5-an de Oktobro/2012. Niajn sincerajn dankojn, kara Frato, pro via fekunda laborado por la Triobla Idealo: Evangelio, Spiritismo, Esperanto. Ĝis baldaŭ, onklo Hakilo!

Eldonejo Lorenz

N.R.: Se vi volos koni aliajn detalojn pri la vivo de Edgard Monteiro Machado, legu la intervjuon sur la paĝoj de Almanako Lorenz 2011. Se vi ĝin ne havas, petu kaj ni tuj ĝin sendos al vi.





"Spiritismo havigis al mi novan vivmanieron, helpis min elteni la necesajn sortobatojn. Nun mi vidas kiel la Spiritisma Doktrino transformis al mi la vivon, anstataŭigis mian malcedeman karakteron kaj faris el mi homon pli humilan, inklinan al bonfarado".

Edgard M. Machado

Esperanto sendube plenumas mirindan rolon interligi la homojn kun la homaro. Spiritismo kaj Esperanto profunde tuŝas al ni la menson, montrante nin kiel membrojn de la homaro, nin avertante pri nia respondeco en la plibonigo de la mondo, en kiu ni vivas".


Edgard M. Machado




Finfine ĝi alvenis: **ALMANAKO LORENZ 2013**, enhavante artikolojn el la plej diversaj anguloj de la mondo: TREVOR STEELE, RENATO CORSETTI, FIRDAUS SUKUROV, ROGER DEGRELLE, AURORA BUTE, BARDHY ADEM SELIMI, ANATOLI IONESOV, PROF. SERGEJ GRIGORJEVICH HMELNICKIJ kaj ankaŭ brazilanoj partoprenas. Tamen, ni pliatentigas koncerne la artikolon de la brazila samideano, CIRO GOMES DE FREITAS, pri "Komplekso de la Geodezia Centro de Brazilo", kaj ankaŭ pri la artikolo de RENATO CORSETTI: "Spiritistoj parolas pri Frateco – La Mondo Parolas pri Malfrateco".

Ne perdu tempo kaj petu tuj vian ekzempleron!

Lanĉa prezo: **R$ 12,00** (**4 eŭroj**)




## AGENDO LORENZ 2013

kun speciala omaĝo al la kartokolektantoj el la tuta mondo. Vojaĝu tra la mondo per la belaj esperantistaj poŝtkartoj!

**ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2013?!!!**

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la komforto de via hejmo.

Dio benu vin!

**editora_lorenz@uol.com.br**
Tel. (21) **2221-2269**

LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Rua Francisco Vale, 57
Engenheiro Leal 21370-171 – Rio de Janeiro (RJ)
Brasil – Brazilo

En Komunikoj 147 ni eraris la temon de la prelego de samideano Elmir dos Santos Lima, en la UK - Hanojo: "Materia Karito kaj Morala Karito", jen la ĝusta temo. (N.R.)